Servia.—The Servian Esperanto Society has just begun publication of a periodical, *Serba Esperantisto*, at Belgrade. The manager is Dragomir M. Andonovic, and his address Pop Lukina 4. Send a five-cent reply-coupon (buy it at your post office) and add a sample of this periodical to your propaganda collection.

Peru.—Recent numbers of *Antaŭen Esperantistoj*, the local Esperanto magazine, show a decided improvement in contents and spirit over those of last year.

Switzerland.—At a bazar given for the benefit of a missionary fund, cravats, cushions, etc., emblazoned with the Esperanto emblem, were sold, and with each was a Ĉefeĉ Key. A long and detailed report of local activities in Geneva shows that the Esperanto movement is in very vigorous condition there.

Russia.—Although Russia is the birthplace of Esperanto and its author, the first convention of Russian Esperantists has just been held—with the consent of the government. The Russian Esperanto magazine is a healthy-looking piece of work, and the last issue contains many reports of activities throughout the empire.

Belgium.—Thousands are studying Esperanto in Antwerp, in anticipation of the Seventh Esperanto Congress in that city in 1911.

Austria.—The Esperantists of Austria celebrated a national "Esperanto Day" in May.

Oscawana, N. Y.—En la lernejo de la Nova Penso (New Thought) kondukita de W. F. Keeler kaj aliaj, Esperanto estas regule instruita. Ĉe Oscawana la Novapensanoj havas tendaron, kaj la tendo de Sro. Keeler portas la verdan standardon. Oni eĉ sukcesas amikigi al Esperanto Elizabeth Towne, redaktorinon de la *Nautilus* (Holyoke, Massachusetts).

FOR BEGINNERS

EK, IĜ, IG

There has never seemed, to me, sufficiently clear instructions as to the use of *ig* and *iĝ*. Do not most Esperantists use these erroneously, and often where there is no need of them?

Answer.—Yes. There is such a thing as being too precise. Logic and the healthy instincts derived from use are sometimes more reliable than pure theory. "The train moved at the rate of sixty miles an hour." "After halting a few minutes, we moved on." "If you don't move, sir, I'll have to move you!" When the meaning of a word is perfectly clear, and likely to be so under ordinary circumstances, it is vain, pedantic and clumsy to load it with an extra syllable. Some well-meaning theorists think they are simplifying the language by trying to explain that a certain verb is naturally

transitive, or naturally intransitive, when as a matter of fact it is both. According to them, when the train starts, it *ekmoviĝas*; when it is running, it *moviĝas*; the engineer *movas* the throttle-lever and thus *moviĝas* the train. One of the many reasons contributing to the ignominious failure of the "reform" movement known as Ido was that they tried to make a language comically precise. For example, in Ido, the engineer would "oil-ize" his engine and "move-ify" the train. With such a language it is simply a question of throw it in the waste-basket or use it incorrectly or go crazy. There is no good reason for anybody's losing a moment of sleep over *iĝ* and *ig*. A respectable old couplet covers the question thoroughly: "When in doubt, leave it out." When in doubt, play trumps—that is, use the root word with neither *ig* nor *iĝ*.

PARALLEL READING EXERCISE

SAYINGS OF "POOR RICHARD"

Benjamin Franklin

MANY words will not fill a bushel. God helps them who help themselves.

The used key is always bright.

Do not squander time; time is the stuff that life is made of.

"Time enough" always proves little enough.

He that riseth late must trot all day and shall scarce overtake his business at night.

Laziness travels so slowly that poverty soon overtakes him.

He that lives upon hope will die fasting.

DIROJ DE "POOR RICHARD"

Esperantigita de Henry Keeler

MULTAJ vortoj ne plenigos buŝelon. Dio helpas tiujn, kiuj sin mem helpas. La ŝlosilo multe uzata estas ĉiam hela.

Ne malŝparu tempon, ĉar tempo estas la substanco, el kio vivo elfariĝas.

"Tempo sufiĉa" ĉiam iĝas tempo sufiĉe mallonga.

Tiu kiu malfrue leviĝas devas troti tutan tagon kaj apenaŭ atingos sian aferon ĝis noktiĝo.

Mallaboremo vojaĝas tiel malrapide ke malriĉeco baldaŭ atingos ĝin.

Tiu kiu sin nutras per espero mortos fastante.

Industry pays debts.

Diligence is the mother of good luck.

One today is worth two tomorrows.

Drive thy business; let not thy business drive thee.

Have you something to do tomorrow, do it today.

The cat in gloves catches no mice.

Little strokes fell great oaks.

Employ thy time well if thou meanest to gain leisure.

Since thou art not sure of a minute do not throw away an hour.

Trouble springs from idleness and grievous toil from needless ease.

Fly pleasures and they will follow thee.

Three removes are as bad as a fire.

Want of care does more damage than want of knowledge.

Not to oversee workmen is to leave them thy purse open.

If thou wouldst have a faithful servant and one that thou likest, serve thyself.

For want of a nail the shoe was lost; for want of a shoe the horse was lost; for want of a horse the rider was lost, being overtaken and slain by the enemy; all for want of care about a horseshoe nail.

What maintains one vice would bring up two children.

Many a mickle makes a muckle.

Fools make feasts and wise men eat them.

When the well is dry they know the need of water.

Wouldst thou know the value of money try to borrow some.

He that goes a-borrowing goes a-sorrowing.

Pride is as loud a beggar as Want and a great deal more saucy.

The second vice is lying; the first is running into debt.

It is hard for an empty bag to stand upright.

Industriemo pagas ŝuldjn.

Diligento estas la patrino de bonŝanco.

Unu hodiaŭo valoras du morgaŭojn.

Puŝu vian aferon kaj ne lasu ĝin puŝi vin.

Se vi havas ion por fari morgaŭ, faru ĝin hodiaŭ.

La kato kun gantoj kaptas nenian musojn.

Malgrandaj hakilbatoj faligas grandajn kverkojn.

Bone okupu vian tempon se vi intencus akiri ludotempon.

Por tio, ke vi ne estas certa pri minuto, ne forĵetu horon.

Ĉagreno elvenas el senokupo kaj doloriga laborado el nenecesa komforto.

Forflugu de plezuroj kaj ili sekvos vin.

Tri transloĝigoj estas tiel malbonaj kiel detrua brulego.

Manko de zorgo kaŭzas pli multan difektaĵon ol manko de scio.

Ne observadi laboristojn, estas lasi al ili vian malfermitan monujon.

Se vi havus fidelan serviston kiun vi ŝatus, servu vin mem.

Pro manko de najlo la huffero perdiĝis; pro manko de huffero la ĉevalo perdiĝis; pro manko de ĉevalo la rajdanto perdiĝis, atingite kaj mortigite de la malamiko; la tuto, pro manko de zorgo pri huffera najlo.

Tio, kio subtenas unu malvirton, povas elnutri du infanojn.

Multaj malmultoj faras multon.

Malsaĝuloj faras festenojn kaj saĝuloj manĝas ilin.

Kiam la puto elsekiĝas oni koniĝas kun la bezono de akvo.

Se vi konus la valoron de mono, penu pruntepreni ion.

Li, kiu prunteprenante iras, ĉagrenonte iras.

Fiero estas almozulo tiel alkriema kiel seneco kaj multege pli impertinenta.

La dua malvirto estas mensogi, la unua estas fari ŝuldojn.

Estas malfacile al malplena sako stari vertikale.

LITERATURO

LA AMANTOJ DE GERTO.

Laŭ William Norris tradukis E. J. Burnham
(Daŭrigo)



LUKNARO frapis ĉe la pordo, tiam eniris, kiam neniu respondis; kvankam li nenium tie vidis, li diris laŭte, kva-zaŭ li malfidis sian povon rediri tiun lernitan parkere per tia doloro lecionon: "Mi alportas al Nobelino Gerto parolsendaĵon."

Nur la malvarmeco de la ombroplenaj kverkaj traboj renkontis liajn okulojn, nur la eĥo de lia propra kava voĉo, la pepado de la paseroj, kaj la kriego de la kamentubaj hirundoj rekontis liajn orelojn.

Ĉar Gerto ne estis interne, sed de la arbaro ŝi estis vidinta la brileton de liaj armiloj en la varmega meztago, kaj venis malsupren, grandioze kaj malrapide, ŝaj-nante nekortuŝita, sed ŝia koro el koroj ŝanceliĝis interne de ŝi pro espero kaj timo kaj la ekstazo de amo; eble (ho, kompatinda koro, kiaj ventegaj esperoj!) tiu estas la Reĝo.

Ŝi lin renkontis ĝuste ĉe la pordo, de kiu li sin direktis, serĉante ŝin. Li ne kuraĝis renkonti ŝiajn okulojn, tiujn grandajn fajrsferojn, kiuj lin estis trapikintaj tra kaj tra, je tiu alia tago. Se li estus rigardinta supren al ŝia vizaĝo, li estus vidinta la malkontentiĝon, la malsanecon de espero prokrastita, kiu iom montriĝis tie, malgraŭ ŝia penado por reteni ĝian aperon.

Forturnigante sian vizaĝon, li diris per sensenta voĉo, kiel antaŭe, "Mi alportas al la Nobelino Gerto parolsendaĵon." Nenia ruĝiĝo koloris ŝiajn palajn vanĝojn, nenia eksalto nek tremo trairis tra ŝia grandioza formo; ankoraŭ ŝi per ŝia mano tenis floron, tenante ĝin laŭ reĝina maniero, ĉar ĝi konvenas kiel sceptro en

ŝia mano. Ŝi kviete diris, "Se vi volas la Nobelinon Gerto, vi devas iri aliloke, mia sinjoro; mi estas la filino de Sigurdo, la terkulturisto."

"Sed vi ĵas estas Gerto, kiun kantantan ni aŭdis, tiun tagon," li diris perforte, kaj turnigante al ŝi siajn avidajn okulojn.

"Jes," ŝi diris, iomete tremante kaj fariĝante eĉ pli pala, pro tio ke ŝi ekvidas kiel la afero staras je li, kaj timas, neniam perforton de li, ĉar ŝi tuj lin tute tralegas, sed anstataŭe ke li falos malsupren mortinta, tiel forte lia pasio disŝiras lian koron.

"Gerto, Olafo la Reĝo diras, 'Ĉu vi estos Reĝino?'" ankoraŭ avide rigardante ŝin, li diris.

La ruĝega sango superverŝegis ŝian vizaĝon, tiam reiris al ŝia koro, lasante ŝiajn lipojn grizaj. Ŝi paŭzis dum momento, kaj, kun siaj brakoj streĉitaj rekte malsupren kaj siaj manoj firme tenitaj, ne levante la okulojn, ŝi diris:

"Diru al li 'Ne'; mi estas tro humila, nesufiĉe saĝa; lin mi hontus; mi ne estos Reĝino—sed—"

Kiaj furiozaj pasioj kuris tra la koro de la kompatinda Luknaro! Kiel li batalis kontraŭ la diablo, kiu lin en la vizaĝo estis rigardinta konstante tiel longa, de kiam li naskiĝis, ĝis nun!

Ŝi kviete staris tie antaŭ li, kun siaj brakoj streĉitaj, malsupren, siaj manoj firme tenitaj; li kaptis ŝin je la manradikoj, kaj preskaŭ ekkriegis, "Sed kio? Gerto! Gerto! antaŭ Dio, ĉu vi amas lin?"

Ŝia koloro venis ree dum ŝi rigardis lin en la vizaĝo, tre proksimigata al la ŝia, nun, tiel ke ŝi sentis lian spiron; ŝi diris trankvile, preskaŭ fiere, "Jes, mi amas lin; kiel povus esti alie?"

"Ian amsignon, tiam, pro Kristo. Rapidu, Gerto! kaj kie vi estos dum la milit-tempo?"

"Mia patro estas irona kun mi al la urbo. Mi loĝos ĉe la monaĥinejo de la

Sanktulino Agnes, ĝis Boraco estos venkita.”

“Ian amsignon do! Jen!” (kaj li deŝiris de la dometa pendaĵo fasketon de la ŝtonkropo) “se vi amas lin (pensu pri Dio, Gerto), kisu tiun ĉi.”

Ŝi klinigis sian kapon, kaj tuŝis la flavajn florojn per siaj lipoj; dum ŝi faris tiel, li kurbiĝis kaj kisis ŝian frunton; tiam, kun la floroj ankoraŭ en sia mano, li vivege saltis en sian selon kaj galopadis kvazaŭ por sia vivo. La diablo estis venkita en la fino.

“Kompatinda kavaliro!” diris Gerto, lin rigardante kompateme, “li do ankaŭ amas min. Ŝajnas malprave ke mi sentus min feliĉa, kiam tia nobla kavaliro estas tiel mizera.”

Tamen ŝi ja sentis sin tre feliĉa, kaj baldaŭ forgesis la kompatindan Luknaron kaj lian ĉagrenon, tiun kiu dume rajdadis furioze tra la arbaro; tamen, dum li fariĝis pli malproksim de ŝi, la furiozeco de lia pasio iom kvietiĝis. Li donis al sia ĉevalo ripozon, fine, kaj desaltinte, kuŝiĝis sur la filikoj flanke de la arbarvoĵeto, kaj tie, tute eluzita en animo kaj korpo, ekdormis; estas senreva dormo, komence, preskaŭ tiel profunda kiel morto; tamen, kiam ĝi malpeziĝas, li ekrevas, kaj fine vekigis el revo en kiu Gerto venis al li, kriegis ke Olafo estas mortigita, tiam ĵetis ŝiajn brakojn ĉirkaŭ lian kolon; sed kiam li penis kisi ŝin, li vekigis, kaj sin trovis sub la fagbranĉoj, kun la ĉevalo staranta super li, kaj la brido libere pendanta de la buŝaĵo, balancanta ĉirkaŭ lia vizaĝo; ĉar lia ĉevalo dubis ĉu li ne estus mortinta.

Li leviĝis el tiu revo kun granda ekstordo ĉe sia koro, kaj sursaltinte, pense rajdis antaŭe. La luno brilis sur lin nun, ĉar li estis dorminta longe en la nokton. La ŝtonkropo estis velkanta rapide, kaj dum li ĝin rigardis, li dubis, ĉu li malbenos ĝin, sed fine levis ĝin al sia buŝo kaj ĝin kisis, sciante kies lipoj ĝin estis tuŝintaj antaŭe, duontimeme ekrigardante super sia ŝultro dum li faris tiel. Eble li iomete pensas ankaŭ kiel la vizaĝo de Olafo ekruĝiĝos en perfekta beleco

pro ĝojo, kiam li vidos ĝin, pro ĝojo miksitaj je ia speco de bedaŭro por Luknaro.

Kiam do li, tre malfrue en la nokto, atingis la palacon, kiam la luno estis jam malleviĝanta, li trovis Olafon starantan sole en la granda salono, ŝajnante pala kaj lacigita.

Luknaro venis tre proksime al li, kaj prenante lian manon, kaj ridetante kvazaŭ per malsana rideto, diris, “Olafo, ŝi sendis al vi tion, kisiĝinte ĝin.” Olafo la velkitajn florojn ekprenis, ilin kisis milfoje, kaj genufleksante, ilin premis sur sia koro, sur sia frunto. Li murmuris—kiajn vortojn mi ne scias, aŭ sciante, ne diros; dum Luknaro staris apude kun tiu malnova, maldolĉa rideto sur siaj lipoj. Kompatindulo! li estis atendinta subitan ĉirkaŭ li ĉirkaŭprenon per la brakoj de Olafo, laŭdon pro sia nobleco, konsolon pro sia malsukceso. Ho! ĉu li mem ne sciis kia pasio estas amo? Kial do, de tia sincera viro kiel Olafo, li atendis protestojn ke li estas la unua, kiam li estas nun nur la dua? Ho! vi ĉiuj scias tion, kio estas sin trovi la dua en tia konkurso; tio estas sin trovi nenie! Ankaŭ do li, se li estus prosperinta, estus forgesinta Olafon, kaj forgesus kiel en la batalo lia glavo fulmis. Estis nur nun, dum lia malkontentiĝo, ke ia natura instinkto devigis lin peni por kapti ĉiun amon, de kia ajn speco ĝi estas, kiu venus apud li.

“Kompatinda Luknaro!” li diris en si mem, “vi devas esti tre malproksima en la fono nun; sciu tion certe. Ĉu vi do ne sciis ĉion tion ĉi tiam, kiam vi genufleksis tie ĉi antaŭ kelkaj dek du horoj? Ho! malsaĝa Luknaro! ankoraŭ kompatinda Luknaro ankaŭ!”

Kaj li estis tiel malproksime de ridetado ke sed pro sia vireco, li estus plorinta pro memkompato. Olafo, metante siajn manojn sur liajn ŝultrojn, kaj kliniĝante antaŭe al lia vizaĝo, aliris al li kaj diris,—“Vi estas la plej nobla el viroj, kaj neniel perdos vian rekompencan.”

Kaj tion sciis Luknaro, aŭ eble li freneziĝus; tamen li preĝis ke lia rekom-

penco estu baldaŭa morto en la ĝojo de batalo. Tial, en la morgaŭa tago, ili marŝis renkonte kontraŭ Reĝo Boraco, kaj en la vespero de la tria tago ili entendarigis nur iom malproksime de liaj piratoj.

Kaj tiam, kiam en la proksima tago matene, ili staris en batalordo, kaj la Reĝo rajdis tien kaj reen laŭ iliaj vicoj, Luknaro vidis en lia kasko la fasketon de ŝtonkropo, nun tute velkinta.

Do, tiun tagon, inter la tremoloj, komencis la batalon.

La Lumo de Israelo

Tiam, en la mezo de ili, la maljunulo leviĝis kaj parolis, dum ĉiuj aliaj silente sidis, unuj fikse rigardante la teron, aliaj la antaŭ ili belan mortintan Reĝon.

Tial ke li estis mortigita per sola vundo, kiu estis irinta tute tra lia brusto ĝis la koro, lia korpo ne estas hakita aŭ malbeligita. Oni estis demetinta de li lian disŝiritan armaĵon, kaj lavinta lian kadavron, kaj etendinta liajn longajn flavajn harojn dekstre kaj maldekstre laŭ lia vizaĝo sur la purpuran, orstemarkitan, veluran drapon, sur kiu li kuŝis; kaj malantaŭ li, ĉe lia kapo, oni estis metinta lian glavon kaj armaĵon, la kasko ankoraŭ en ĝi havanta la ŝtonkropon, almenaŭ la ekstrecojn de la trunketoj; ĉar ĉiu restaĵo estis deŝirita en la furioza batalo. Tute ĉirkaŭ li brulis grandaj vaksaj kandeloj; vestitaj per belegaj roboj de malhela funebra purpuro, orbrodita, pastroj sidis duope ĉe la kapo kaj la piedo de la mortintportilo, ĉar tiuj viroj tiel multe riverencis la homan korpon, eĉ tiam, kiam la animo jam ne estas tiel proksima kiel ĝi estis, ke, dum tiuj horoj de dubo kaj danĝero, ili opiniis ke la tempo estas tbone elspezita por fari ia korpon de ilia reĝo—de li, la plej bona kaj plej bela de ĉiuj viroj, tiel bela kiel Dio iam permesus ke mortintaj korpoj estu.

El la pastroj kiuj sidis apud li, unu, lacegigita prizorgante la vunditojn kaj mortantojn, dormis, kaj lia kapo estis falinta sur sian bruston; alia tute rekte

suprensidigis, kun siaj manoj sur siaj genuoj, pensante pri tio, kio estas venonta al la lando; la tria, malgrasa, juna viro, nigrahara kaj kun flavpala vizaĝo, pro sia nerva maltrankvileco, ektiradis la randon de sia pastra mantelo, dum li ekrigardis ĉirkaŭ la tendo, rigardante maltrankvile la vizaĝon, jen de unu, jen de alia, de tiuj, kiuj tie sidis; la kvara dum li sidadis malĝojavizaĝe kaj grandokule, pensante pri sia patrino kaj fratinoj, kiujn li estis forlasinta en la kastelo de la malalt-lando, preninte longan, flavan plektaĵon de la haroj de la mortinto, kaj ĝin distrite ĉirkaŭ siaj fingroj volvadis.

(Daŭrigota)

JANE CONQUEST

Por *Holanda Pioniro* tradukis H. Blok

JANE estas sidanta en simpla domo kun sia malsana infaneto kontraŭ la brusto. La malplena lulileto staras apud de ŝi. La vento bruas tra la kamentubo; neĝventego ĵetas la neĝon montalte. Jane aŭdas kun timo la bruadon de la vento kaj la ruladon de la ondofrapado, ĉar ŝia viro estas sur la maro kaj ĉiumomente lia alveno estas atendota. Subite ŝi aŭdas surdan bruon super la siblo de la vento.

2. Ŝi leviĝas, iras al la fenestro kaj rigardas kun timo trans la furioze rulantaj ondoj, kiuj de tempo al tempo estas lumigataj per la luno; ŝi pensas vidi ŝipon en la ondofrapado. Timeme ŝi premas sian infaneton kontraŭ la koro.

3. Subite la maro estas lumigata per roza ardo. Klare ŝi vidas la ŝipon, kiu estas en la ondofrapado kaj cetere brulas. Estas terura sceno! Kiu alportos helpon! La tuta vilaĝo estas en profunda trankvileco. Neniu povas nur supozi en kia terura danĝero la ŝiprompuloj sin trovas. Sole Jane ĝin scias kaj ŝi ne povas fari ion; ŝi ja ne povas lasi sole sian infaneton, kiu de tempo al tempo havas treegajn sufokecojn. Ŝi ne havas plu konsilon kaj kuŝigas sian infaneton en la lulileton.

4. Ŝi genufleksas ĉe la lulileton kaj pri-pensas unu kaj aliajn (kaj preĝas al Dio pri helpo). Ŝi ja tiel volonte gardus sian infaneton sed ankaŭ ŝi volonte kurus al la preĝejo por sonorigi la ventegsonorilon. Kion ŝi devas fari? Ŝi havas teruran internan batalon. Fine ŝi prenas decidon.

5. Voĉo saĝnas diri al ŝi: Iru Jane! iru sonorigi la brusonorilon. Dio protektos vian infanon.

6. Trankviligata ŝi leviĝas kaj kuras eksteren. Preskaŭ senprotektata; nur tuketon ĉirkaŭ la kapo, ŝi staras tie en la malvarma nokto sur la malvarmega neĝo. Per la superĉasata neĝo ŝi ne povas distingi la vojon; feliĉe la luno rompiĝas tra l'amaso de l' nuboj kaj tre malproksime ŝi vidas brili la blankan tegmenton de la preĝejeto. Ŝi kuregas trans la neĝsupraĵon kaj baldaŭ atingas la preĝejeton.

7. La teruro tamen premas ŝian bruston. Ŝi pensas plentime al la ebleco, ke la preĝejpordo estu ŝlosata. Kion tiam? Al tio ŝi ne ankoraŭ pensis. Kaj la pordo estus ŝlosata. Kun la forto de la mal-espero ŝi premas kontraŭ la pordo kaj dank'al Ĉielo, ĝi krakas. Ankoraŭ unu premo, ankoraŭ unu puŝo, kontraŭ la ruiniĝanta pordo kaj jen . . . ĝi malfermiĝas. Jane kuras kiel sur flugiloj tra la malluma preĝejo al la loko kie devos pendi la sonorilŝnurego. Ŝi ne estus trovanta ĝin se la luno ne estis juŝ rompiĝanta tra la nuboj kaj ne sendis fantoman lumon tra la malhela preĝejarkaĵoj.

8. Jen ŝi nun estas tiranta kun ĉiaj siaj fortoj kaj baldaŭ la unuaj tonoj de la alarmsonorilo aŭdigas sin super la siblo de la ventego. Bom, Bom. . .

9. Jane daŭrigas la tiradon, sed ŝi demandegis tro multe de siaj malfortaj fortoj; ŝi enfalas . . . kaj baldaŭ ŝi kuŝas kiel rigidigata kun sia kapo etendata sur la malvarmega preĝejfundo. Kun la maldekstra mano si tenas ankoraŭ konvulsie la ŝnuron kaj la dekstra mano kuŝas senforte sur la glacmalvarmaj ardezoj.

Intertempe la vilaĝo ekmaldormiĝis. La bombado de la brusonorilo ekterurigas ĉiujn kaj baldaŭ oni sciis, kie la danĝero minaciŝ.

10. Inter kelkaj minutoj la viroj estas pretaj por enporti la savboaton en la maron kaj baldaŭ la ŝipestro donas la signon por foriri. Jen balancas la boato sur la furiozaj ondoj kaj la savontoj faras ĉion, kion ili povas. Ili havas la ĝuon atingi baldaŭ la brulantan ŝipruinon kaj savi ĉiujn ŝiprompulojn. Ankaŭ Conquest, la edzo de Jane, estas inter la savitoj.

11. Kaj nun li staras antaŭ lia domo, mortlacigata. La pordo estas fermata kaj ĉio saĝnas dezerta. Teruran timon li sentas—kio estas okazinta! Li malfermrompas la pordon kaj staras frakasata ĉe la sceno, kiun vidas siaj okuloj. Jane ne estas tie kaj sia infaneto kuŝas en la lulileto. Kia trompo! Antaŭe li estis tiel ravata pri la savo kaj la estonta revido. Nun li malbenas la vivon kaj deziras sin morta. . .

12. Ĉu tiu frapo estas tro peza por li; li malleviĝas kaj restas kuŝi senviva duone sur la planko, duone kun la kapo en la manoj sur la seĝo.

Intertempe la savintoj estis irantaj al la sonorigisto por lin honori pri lia laboro. Sed ili trovis lin, je ilia granda miro, dormanta. "Ĉu vi ne sonorigis la brusonorilon," demandis lin. "Ne!" "Kiu tiam?" La sonorigisto ne komprenis ĝin kaj volis scii la aferon detale . . . li estis iom superstiĉa.

Li prenis brulantan lanternon kaj rapidiĝis timeme al la preĝejo. Li serĉis la sonorilŝnuron.

13. Sed trovis je lia granda teruro virinon, malvarmega kaj kiel frostiĝinta sur la ardezvestiblo. Ankoraŭ ĉiam si tenis la ŝnuron konvulsie en la manoj.

Li rekonis en ŝi Jane Conquest kaj ekzamenis ĉu ŝi ankoraŭ vivis. Dank'al Ĉielo, ŝia koro ankoraŭ batis kaj baldaŭ li povis, frotante ŝin kun neĝo, reveki ankoraŭ la vivspiritojn. Kiam Jane estis resanigita, ŝia unua demando estis pri ŝia edzo kaj ŝia infano. La sonorigisto trankviligis ŝin kaj baldaŭ portis ŝin hejmen.

14. Tie ŝi trovas sian edzon, ankoraŭ en la sama stato. Ĉi tiu frapis sin la manon kontraŭ la frunto kaj ne ŝajnas kredi, kion li vidas. Lia edzino ĉion

klarigas kaj montras al li siajn manojn, en kiuj la impresoj de la sonorilŝnuro estas ankoraŭ vidataj.

La sonorigisto intertempe prenis la ŝajne mortan infaneton kaj diris, je ne esprimebla ĝojo de la gepatroj, ke li ankoraŭ vivis, ke li estis nur en kunvulsio. Daŭris nur kelkaj minutoj plu ĝis infaneto levas la okulojn kaj rigardas mire siajn feliĉajn gepatrojn per siaj malgrandaj okuloj.

15. La gepatroj ankoraŭ longtempe restis genufleksataj je la lulileto kaj ĝuas la belegan rigardon de la ŝajne tute resanigata infaneto.

Li sonorigisto disvastigis la heroan agon de Jane en la vilagon kaj la feliĉe savitaj ŝiprompuloj memoris sian amindan savintinon en siaj preĝoj.

LA VIZIO DE MIRZA

Laŭ Joseph Addison tradukis William Mann por *The British Esperantist*

KIAM mi estis en Granda Kajro, mi trovis kelkajn orientajn manuskriptojn, kiujn mi ankoraŭ havas. Interalie mi trovis unu titolitan "La Vizioj de Mirza," kiun mi tralegis kun granda plezuro. Mi intencas prezenti ĝin al la publiko, kiam mi ne havos por ĝi alian distraĵon; kaj mi komencos per la unua vizio, kiun mi laŭvorte tradukas jene:

En la kvina tago de la luno, kiun laŭ la kutimo de miaj prapatroj mi ĉiam solenis kiel sanktan,—min lavinte, kaj farinte mian matenadoradon, mi supreniris la altajn montetojn de Bagdat, por pasigi per meditado kaj preĝado la ceteron de la tago. Dum mi tie supre sur la montoj min aerumadis, mi falis en profundan pensadon pri la vaneco de l'vivo de l' homoj; kaj pasante de unu penso al alia—ja certe—mi en mi diris—nur ombro estas la homo, kaj la vivo sonĝo. . .

Tiel revante, mi ekturnis mian rigardon al la supro de nemalproksima de mi roko, kie mi ekvidis iun vestitan laŭ la maniero de ŝafisto, kun muzikileto en la mano lia. Dum mi lin rigardis, li ĝin metis al la lipoj kaj ekludis. Treege dolĉa estis ĝia sono, kaj kunigita en diversaj arioj ne-

esprimeble melodiaj, tute malsimilaj je ĉio jam de mi aŭdita: ili pensigis min pri tiuj ĉielaj arioj, ludataj al la animoj de l' piaj mortintoj ĉe ilia alveno Paradizon, por distri la impresojn de la lasta agonio, kaj por alfari ilin al la plezuroj de tiu feliĉejo. Mia koro disfandiĝis en sekreta ravo.

Ofte mi aŭdis, ke la tiean rokon vizitadas ĝenio, kiu pli ol unu preteriranton regalis per muziko, sed mi neniam aŭdis, ke li sin al iu videbligis. Kiam per tiuj ravantaj melodioj de li ludataj, li altigis miajn pensojn ĝis kapableco ĝui la plezurojn de kunparolado lia, kaj dum mi lin rigardadis kvazaŭ mirigata, li faris al mi signon kaj per gesto de lia mano petis min al la loko, kie li sidis. Mi alproksimiĝis kun la profunda respekto, kiun eldevigas naturo supera; kaj ĉar mia koro estis tute venkita de la allogantaj tonoj kiujn mi aŭdis, mi falis ĉe liaj piedoj kaj ekploris. La ĝenio ridetis al min, kun rigardo de simpatio kaj afableco, kiu jam kutimigis min al li kaj tuj dispelis tute la timojn kaj maltrankvil-econ, kun kiu mi apudiĝis al li. Li levis min de l' tero kaj prenante min per la mano diris:

"Mirza, mi vin aŭdis en via meditado; sekvu min."

Tiam li min kondukis al la plej alta pinto de la roko kaj metante min sur ĝian supron "Direktu vian rigardon al la orienta," li diris, "kaj diru kion vi vidas."

"Mi vidas," mi diris, "grandegan valon, kaj vastegan amason da akvo tra ĝi fluantan."

"La valo, kiun vi vidas," li diris, "estas la valo de l' mizero, kaj la amaso da akvo, kiun vi vidas, estas parto de la vasta fluo de l' eterneco."

"Kial," mi diris, "la akvo fluo, kiun mi vidas, ĉe unu ekstremaĵo leviĝas el densa nebulo, kaj denove en densan nebulon perdiĝas ĉe la alia?"

"Tio, kion vi vidas, estas tiu parto de l' eterneco nomata la tempo, elmezurita de la suno, kaj etendiĝanta de l' komen-cigo ĝis la finiĝo de l' mondo. Esploru nun tiun maron tiel ĉe ambaŭ ekstre-

aĵoj baritan de l' mallumo, kaj diru, kion vi sur ĝi trovas."

"Ponton mi vidas," mi diris, "starantan meze de l' fluo."

"Tiu ponto," li diris, "estas la vivo de l' homo; atente ni ĝin konsideru."

Esplorinte ĝin pli trankvile, mi trovis, ke ĝi konsistas el sepdek arkoj kompletaj, kun kelke da rompitaĵoj, iuj, aldonite al la aliaj, altigis ĝis ĉirkaŭ cent la tutan nombron. Dum mi kalkulis la arkojn, la ĝenio diris al mi, ke la ponto unuatempe konsistis el cent arkoj, sed ke vasta superakvo forbalais la ceterajn kaj lasis la ponton en ĝia nuna ruina stato.

"Sed diru plu," li daŭrigis, "kion vi sur ĝi vidas."

"Mi vidas amasojn da homoj trans ĝi pasantajn," mi diris, "kaj nigran nubon pendantan ĉe ambaŭ ĝiaj finoj."

Kaj kiam mi pli atente rigardis, mi vidis kelkajn el la pasantoj fali tra la ponto, en la grandan fluon, kiu sub ĝi fluadis; kaj plua esplorado montris, ke sennombraj klapopordoj kuŝis kaŝitaj en la ponto, kiuj, apenaŭ la pasantoj tuŝis, tuj tralasis ilin malaperontajn en la fluegon. Ĉi tiuj kaŝitaj trakaptejoj kuŝis tre dense ĉe la eniro sur la ponton, tiel ke la amasoj apenaŭ rompiĝis el la nubo, multaj el ili senprokraste enfalis. Ili malplidensiĝis al la mezo, sed ree multiĝis kaj apudiĝis en tiu ekstremaĵo, kie estis la kompletaj arkoj.

Estis ja kelke da personoj, tamen tre malmultenombraj, kiuj daŭrigis ian lamantan iradon sur la rompitaĵoj, sed fine unu post alia trafalis, tutlacigite kaj elĉerpate pro marŝado tiel longa.

Mi pasigis kelkan tempon rigardante tiun konstruaĵon kaj la tre diversajn objektojn, kiujn ĝi prezentis. Mian koran plenis profunda malĝojo kiam mi vidis, kiel kelkaj subite trafalas meze de gajeco kaj bonhumoro, kaj kaptas al ĉio apuda por sin savi. Iaj en pensoplena teniĝo suprenrigardis al la ĉielo, kiuj meze de ia spekulacia revado faletas kaj malaperas for de l' vido. Tutaj amasoj estis plej absorbataj pri la persekutado al aervezikoj kiuj briladis kaj dancadis antaŭ iliaj okuloj, kaj ofte kiam ili pensis sin tuj

atingontaj sian celon, jen elglitas al ili la piedo kaj jam ili falas malsupren. En tiu konfuziĝado mi rimarkis kelkajn kun glavoj en la mano, kaj aliajn kun piloluloj, iuj kuras tien kaj reen sur la ponto, deŝovante la pasantojn al klapopordoj ŝajne ne kuŝintaj sur ilia efektiva vojo, kaj kiujn ili povus jam eviti, se ne okazus tiu altrudiĝado.

La ĝenio, rimarkante, ke mi cedas al ĉi tiu melankolia vidaĵo, diris, ke mi jam sufiĉe longe ĝin rigardis.

"Deturnu viajn okulojn de l' ponto," li diris, "kaj diru, ĉu vi ankoraŭ vidas ion, kion vi ne komprenas."

Mi rigardis supren. "Kion signifas," mi diris, "tiuj grandaj aroj da birdoj, kiuj senĉese superflugadas ĉe la ponto kaj de tempo al tempo sur ĝin sidiĝas? Mi vidas vulturojn, harpiojn, korvojn, kaj inter multaj aliaj plumuloj kelke da flugilhavaj knabetoj, kiuj sidas grandanombre sur la arkoj de l' mezo."

"Ĉi tiuj," diris la ĝenio, "estas la envio, la superstiĉo, la malespero, la amo, kaj tiaj similaj zorgoj kaj pasioj, kiuj maltrankviligas la vivon de l' homoj."

Ĉe ĉi tio mi profunde ĝemis.

"Ho ve!" mi diris, "vane la homo estis kreita! Kiel li estas forlasita al la mizero kaj la mortemo! turmentata en sia vivo, kaj englutata en la morto!"

La ĝenio min kompatante, admonis min forlasi vidaĵon tiel malĝojigan.

"Ne rigardu plu," li diris, "la homon en la unua stadio de lia ekzistado, ĉe lia ekiro sur la vojon de l' eterneco; sed turnu viajn okulojn al tiu densa nebulo, en kiun la fluo portas la generaciojn de l' mortemuloj en ĝin falintajn."

Mi direktis mian rigardon laŭ lia monstro, kaj (ĉu ĉar la bona ĝenio donis al mi forton supernaturan, aŭ distris parton de l' nebulo ĝis tiam por miaj okuloj nepenetrebla) mi vidis, kiel la valo ĉe la pli malproksima fino malfermiĝas, kaj dislarĝiĝas en vastegan oceanon, tra kies mezo kuŝas grandega adamanta roko kaj ĝin disigas en du partojn. La nuboj ankoraŭ restis sur unu ĝia duono, tiel ke mi tie povis nenion ekvidi: sed la alia ŝajnis esti

vasta oceano plantita per sennombraj insuletoj kovritaj de fruktoj kaj floroj, kaj intertekstaj de mil brilantaj maretoj ĉi tien kaj tien fluantaj. Mi vidis estaĵojn vestitajn per gloraj vestoj, kun girlandoj sur la kapo, pasantajn inter la arboj, kuŝantajn apud la fontanoj, aŭ ripozantajn sur bedoj de floroj; kaj mi povis aŭdi la konfuzatan harmonion de kantantaj birdoj, falantaj akvoj, homaj voĉoj kaj muzikiloj. Kreskis ĝojo en mia koro ĉe la vido de tiel ravanta sceno. Mi deziris la flugilojn de aglo, por ke mi povu forflugi al tiuj feliĉejoj: sed la ĝenio diris al mi, ke tien neniu povas aliri, krom tra la pordoj de l' morto, kiujn mi vidis ĉiumomente malfermiĝantajn sur la ponto.

“La insuloj,” li diris, “kiuj tiel freŝaj kaj verdaj kuŝas antaŭ via rigardo, kaj kiuj ŝajne estas dissemitaj sur la tuta supraĵo de l' oceano, tiel malproksimen, kiel vi povas vidi, estas pli multenombraj, ol la sableroj de marbordo; kaj estas pluaj miriadoj da insuloj post tiuj el ĉi tie videblaj, atingantaj pli malproksimen, ol via okulo aŭ eĉ via imagado povas penetri. Ĉi tiuj estas la loĝejoj de piuloj post la morto, kiuj laŭ la grado kaj speco de virto pro kiu ili distingiĝis, estas dislokitaj inter ĉi tiuj insuloj, kie sufiĉegas plezuroj de diversaj specoj kaj gradoj, konvenantaj al la gustoj kaj perfektaĵoj de la enloĝigitoj; ĉiu insulo estas paradizo altaŭgigita al sia respektiva loĝantaro. Ĉu ĉi tiuj, ho Mirza, ne estas loĝejoj indaj je vetpenado? Ĉu mizera al vi ŝajnas vivo, kiu prezentadas al vi okazojn por gajni rekompencan tian? Ĉu timinda estas morto, kiu vin transportos en ekzistadon tiel feliĉan? Ne kredu, ke vane kreiĝis la homo, al kiu estas rezervata tia eterneco.”

Mi ravrigardis kun neesprimebla plezuro tiujn feliĉajn insulojn.

Fine mi diris:

“Montru nun al mi, mi vin petegas, la sekretojn kaŝitajn sub tiuj mallumaj nuboj, kiuj kovras la oceanon aliflanke de la adamanta roko.”

Ĉar la ĝenio ne respondis, mi turnis

min por ree al li paroli, sed trovis, ke li jam forlasis min; tiam mi turnis min ree al la vizio, kiun mi tiel longe rigardadis; sed anstataŭ la ruliĝanta fluo, la arka ponto, kaj la feliĉaj insuloj, mi vidis nenion krom la longa kava valo de Bagdat, kaj la bovoj, ŝafoj kaj kameloj, sur ĝiaj flankoj sin paŝantaj.

LA NOVA SENTO

El Parolado farita de *Margaret L. Jones*,
Rochdale, Anglujo

KIA temo,—la nova sento—kompreneble estas nedisigebla de Esperanto kaj Esperantismo. Kun ili ĝi ekzistas ĉie, kaj jam tre forte en Rochdale mem, sed mi deziras hodiaŭ vespere, tute humile kaj frate, speciale priatentigi vin al ĝi l. ŭ vidpunktoj la plej larĝaj eblaj.

Unue, do, mi komencas, nomante la novan senton, nova religio, ĉar religio ĝi estas por tiuj, kiuj aŭdis ĝian alvokon. Ĉu ĝi ne, kiel religio, frapas rekte ĉe la koro? Ĉu ĝi ne alterne riproĉas kaj konsolas, humiligas kaj altenlevas la animon? Ĉu ĝi ne instruas al ni ke ĉiuj homoj havas unu komunan Patron kaj, do, ke ĉiuj devas esti komunaj fratoj? Ĉu ĝi ne malfermas al ni senliman landon, plenan de novaj komprenoj kaj ravaj lumoj? Ja, nepre,—kaj plue, estas ja mia firma opinio ke Esperantismo, la nova sento, estas ilo speciale taŭga en la nuna tempo por altiri la homojn al Dio. Ĉu vi iam rimarkis,—malĝoje aŭ eble indiferente, la oftan mankon de fido, aŭ iu ajn kredo, ĉe multaj viaj samaĝuloj? Ĉu vi iam konstatis ke plej ofte tiu manko de religio kondukas al pesimismo aŭ malgajeco? Kaj ĉu vi neniam ankaŭ rimarkis ke tiaj malgajaj kaj pesimismaj personoj tre ofte malfidis kaj neamis la Superan Patron simple ĉar ili malfidis kaj neamis la homojn?

Nu, jen mia pretendo! kiam homoj lernas ami la homojn, ili samtempe lernas ami Dion, ĉar estas la homo mem kiu reprezentas la penson kaj la planon de la Kreanto; kaj tre ofte okazas ke la mal-

fermo de la koro por ami iun homon lasas ĝin libera por la enfluo de Dia amo. Tiu, kiu amas sian fraton neniam malamas la Superan Patron: tiu, kiu serĉas kaj rekonas la bonecon el la homo nepre faros same rilate al Dio; kaj eĉ, amikoj, se vi ne ankoraŭ konsentos al tio, vi ne povas nei ke Esperantismo,—se ĝi estas religio,—estas religio kiu ĝojigas kaj plibonigas siajn anojn. Estus facile ankaŭ citi al vi multajn aliajn religiajn trajtojn, ekzemple, ke Esperantismo jam havis siajn martirojn; ke jam ĝi entuziasmigis milojn da homoj; ke jam ĝi alportis konsolon, savon kontraŭ malespero, aŭ feliĉigis la vivlaboron al multaj. Sed tempo mankas, kaj mi volas trakti kelkajn aliajn fazojn de la nova sento antaŭ ol tedi vin.

“Fremdulo en fremda lando!” Kiel ofte ni aŭdis tiujn vortojn! Kiel ofte sur niaj stratoj kaj en niaj publikveturiloj ni vidis la bedaŭrindan spektaklon de iu fremdulo, ĝenerale malriĉa, kiu estas ĉu mokata, ĉu malŝatata, ĉu ignorata kiel la ŝtonoj mem. Nu, tio estas malprava, sed, feliĉe, sub la influo de la nova sento, ĝi devas pli kaj pli malofte okazi. Ni kredas ke tiu flanko de la Esperantismo estas netaksebla. Imagu la animstaton de iu fremdulo, kiu alvenis en Londonon antaŭ nelonge, nesciante la anglan lingvon, tute senamika, kaj perdinte sian pakaĵon survoje. Sur la perono li staris, malĝoja kaj nehelpebla ĉar neniu komprenis lin. Neniu en tiu granda stacio, ŝajne, parolis france, nek iun el la kelkaj aliaj lingvoj kiujn li mem sciis. De portisto al portisto li kuris, de oficejo, al oficejo, fine de strato al strato, ĝis li trovis policejon; kaj la malvarma, indiferenta angla mondo surrigardis, dum lia valizo kun mono kaj tuta havaĵo estis por ĉiam perdita, kaj li mem, en la pluvema, nokta aero malsaniĝis kaj, fine, devis resti en hospitalo. Imagu tion, kaj tiam kontrastu la okazon egale veran, kiam Esperantisto alvenas en fremdan landon sed vidas tuj la verdan stelon brilantan sur ies vesto. Ne plu ekzistas malfacilaĵo, nek malafableco. Li scias ke por li estas preta ĉia helpo kaj utilo.

Nu, tiu helpema sento devus ekzisti ĉie, kaj ne nur al la vera fremdulo; ĝi devus montriĝi al ĉiuj, kiuj bezonas helpon. La Esperantisto estu konata ĉie kiel frato al ĉiuj, kaj kiel ignoranto de neniu nacio, rango, stato aŭ koloro. Unu el miaj lernantoj en Afriko iam skribis al mi ke kvankam admirante Esperanton mem, Esperantiston li ne povas akcepti ĉar tio instruas ke la nigruloj egalas la blankulojn. Malfeliĉe, ankoraŭ multaj homoj havas tiun vere strangan ideon ke ili mem superas aliajn, forgesante ke la eblaj superaj kvalitoj aŭ ecoj pri kiuj ili tiel fieriĝas, nepre ne estas dank’ al iaj agoj de si mem, sed nur dank’ al la diverseco de naskiĝo, gento, nacio aŭ edukado. Antaŭ la Kreanto neniu havas rajton esti fiera; sed, kontraŭe, ĉiu havas rajton nomi la kunulon frato. Aliaj Esperantistoj, dum ili laŭte parolas pri la interfrateco de la nacioj, forgesas fratiĝi kun siaj najbaroj, aŭ eble, eĉ malamas siajn samideanojn pro iu erara ideo pri rango aŭ servo. Nu, tiuj malbonaĵoj ne devas esti troveblaj ĉe la veraj disĉiploj de la nova sento, kaj ju pli rapide ni dissemos la veran fratecon des pli rapide nia movado triumfos.

Nur mi parolos iom pri la efikoj de la nova sento sur la morojn, kutimojn, k. t. p., de la Esperanta popolo. Esperanta popolo! vi ekkrias,—jes, ĉar nun post dudek-du jaroj kaj post niaj multaj kongresoj, la Esperantistoj fariĝis vera popolo kun iom-post-iom-apartiĝanta nacieco kaj vivado. Vi ĉiuj ja observis, kiel, dum la ĝeneralaj kunvenoj de la grandaj kongresoj, oni preskaŭ ĉiam konservis la egalecon kaj la unurangecon de la tuta kunvenintaro. Tie ne estis diversaj ŝtupoj de sociala rango, sed, almenaŭ ĉe la plimulto, nur la komuna frateco. Malpli rimarkita, kvankam ĝuste tiel vera, estas nun la egaleco ekster la grandaj kunvenoj, ĉe la apartaj movadoj inter la samideanoj; ekzemple ĉe la presistoj, kie redaktoroj kaj laboristoj nomas sin fratoj, ĉe la Ruĝkruca Societo, kie oficiroj kaj plej simplaj homoj rigardas sin kiel egaluloj en la movado; ĉe la sciencistoj, kie ĉiu estas

akceptata kiel samideana helpanto; kaj eĉ ĉe la religiuloj,—plej strange!—ĉar ordinare membro de iu speciala kredo rigardas ĉiujn eksterkredulojn kiel kondamnitaj perdituloj. Rilate al tiu lasta, notu la tre rimarkindajn kaj belajn predikadojn de Katolikoj, Protestantoj kaj Reformekleziistoj dum la kongresoj. Anstataŭ renkonti tie la kutiman netoleremon vi nur trovos sentojn kaj instruojn kiujn ĉiuj povas akcepti. Ĉu ne tio estas frapanta pruvo de la benanta influo de la nova sento? Memoru ke dum preskaŭ du mil jaroj oni predikis al ĉiuj la belan instruon de la Kristo sed nur praktikis ĝin inter iu aparta gento, land—aŭ urbanaro, aŭ al malgranda sekvantaro de iu speciala profeto au kondukanto. Nun, fine, ŝajne, la granda vero ekkompreniĝas ke ĉiuj religioj havas unu saman fonton, kaj unu komunan celon al kiu ni ĉiuj iras.

Rimarku ankaŭ ke en Esperantismo ni trovas la solan veran socialismon, la socialismon kiu, anstataŭ detrui, komencas konstrui novajn leĝojn pri simpla, egala frateco, kaj kiu, ignorante diversecon de havoj aŭ edukadoj tamen staras preta por kunfandigi siajn anojn en unu korpon kiam ajn necese.

Rimarku, plue, en Esperantismo, la egalecon de la seksoj. Ĉu inter ni povas iam ekzisti "virina movado"? Ne, ĉar de la komenco la virinoj agis kun kaj kiel la viroj. Ĉe la Esperantistoj estas jam neniun labora pozicio, neniun klera rango, neniun oficista devo, kiun ne povas fari, plenumi aŭ atingi iu ajn meritanta aŭ taŭga samideanino.

Cetere, ankaŭ ni notu ke ĉe multaj samideanoj ni trovas novan komercadon, pli ĝustan, pli honestan, kaj multe pli ĝentilan. Se iu dubas pri tio, nur estas necese ke li provu mem fari negocon kun iu el la multaj nun bone konataj samideanaj vendistoj.

Pri la mondreguloj, ĉu vi ĉiuj ne jam konstatis ke kreskiĝas nova, internacia bonkamaradeco, nova komprenemo kaj toleremo, nova emo alfarigi sin al la diversaj bonaj kutimoj de ĉiuj? Ĉu ne la plej bonaj moroj el ĉiuj nacioj influos kaj eĉ ekrestos ĉe ĉiu, kiu ilin vidas? Oni povus, kompreneble, diri ke la kon-

traŭo ankaŭ okazos,—ke eble la malbonmoroj de iu nacio influos sur la aliajn. Sed mia respondo estas nea, sen ia hezito, ĉar parolante ĝenerale, estas nur la plej bonaj homoj ankoraŭ kiuj esperantistiĝis. Ke tio estas la vero, pravas la tre konstatabla sento ĉe la kongresoj kiam preskaŭ ĉiu, certe ĉiu vera samideano, estas multe pli ĝoja, multe pli bonhumora, multe pli fratema ol en la ordinara, ĉiutaga vivo. Kial? Ĉar nepre ekzistas pro la kuniĝo de tiom da bonuloj,—en la plej feliĉaj momentoj de ilia vivo,—nepre devas esti ia influo de boneco kiu influas ĉiun, kiu ĝin alproksimiĝas. Vi ja konsentas ke ĝis nun la plimulto el la samideanoj estas bonuloj de ĉiu angulo de la mondo,—la pensuloj, la idealuloj, la filozofoj, la kleruloj, la homamuloj. Do, imagu la grandan efikon kiam el tiuj personoj eĉ ankoraŭ la plej bonaj renkontiĝas por unu komuna kaj alta celo! Tiam imagu ke tiu sentebla influo restos kaj restados dum jaroj kaj vi facile povas kompreni ke iom post iom la nova sento kreadas novan kaj bonan popolon, kun novaj kaj pli larĝaj ideoj kaj idealoj; kaj ke ni vidos, fine, la novan mondstaton kie ĉiu estos liberigita de falskonvenaj reguloj. Al tiu celo nepre kontribuas multe la ĝisnuna, bona kaj jam internacie disvastiĝanta kamaradeco inter la du seksoj.

Pli malfrue, ankaŭ, kredeble, la universala fratemo kaj komprenemo etendos pli malproksimen, eĉ al la bestoj, kies vivojn ni ne plu volos detrui por satigi niajn apetitojn au por false beligi niajn vestojn. Eĉ tio ne estas tro granda paŝo por niaj hodiaŭaj pensoj pri la nova sento, ĉar, kiel estas bone konate, ju pli alte la homoj progresadas, des pli kompatemaj, komprenemaj kaj nebuĉemaj ili fariĝas.

Jen ankaŭ eble, la momento, rimarkigi al vi la grandan nombron da pacifistoj inter ni, kiuj sendube, per Esperanto, influos al fina universala mondpaco.

Mallonge, ne estas troaĵo diri ke la Esperantisma sento enhavas jam ĉiujn aliajn bonajn kaj idealajn movadojn,—do, nepre sekvos, ke iom post iom tiuj movadoj surinfluos reciproke kaj kvazaŭ kunfandiĝos.

PRI DIVERSAJ TEMOJ

ABOUT PROPAGANDA

STOP dreaming! The conditions are the result of the environment, and the only way to change that environment is to teach your neighbor (and yourself) that there is something better in life, and that something worth striving for, than what now surrounds us. No matter how greatly you and I may desire to see certain things accomplished, our dreams will never become realities unless we put our shoulders to the wheel and push strong and hard. And each of us possesses a power which, if wielded in unison, will move mountains.

Did you notice the heading of an item in the newspapers recently? Of course you did, but was the application evident to you? The heading was composed of but few words, but there were volumes of suggestion and information contained in them. "Somebody Wrote to His Congressman." Very simple, indeed, but the result was revolutionary. Do you grasp the point? You do, of course, but for those who do not, let me elucidate the meaning which I would have those words convey to everybody.

When you write to your Congressman, Senator, State Legislator, Governor, Superintendent of Schools, or other public, elective officer, your letter is not consigned to the waste-paper basket, but it receives attention, and the requests contained therein are, if reasonable, complied with. Do I need to be more explicit? Not with Esperantists, for they are all kleruloj, but there are those who, unfortunately for them and for us, have not yet seen the light.

So, get those to write to all those whom I have indicated, asking all sorts of questions, and requesting all kinds of

information. Of course, *you* have already done this, but get your friends to join you in your requests and demands, and have the newspapers and periodicals included in the list already given. Have the Congressmen and Senators ask the State Department what is doing in foreign countries; is Esperanto in use abroad; is it being utilized for business purposes; is it recognized by educators; is it being taught in the public and private schools in this and other countries; are our Consuls giving it due attention; have they made any reports about Esperanto; has the State Department consolidated these reports, if made, and made its information public.

Then, after your friends have asked these questions, utilize the information which they and you have obtained with the local and other periodicals, business men, educators, travelers—in short, make a systematic and thorough propaganda of Esperanto. Then get your friends to join the Esperanto Association of North America, the Universala Esperanto Asocio (of Geneva, Switzerland), subscribe for *Amerika Esperantisto*, *Esperanto* (also of Geneva, Switzerland), as many other Esperanto periodicals as you may be able to afford, and then think out some further propaganda stunts (or "stunts," as you wish), to the end that our knowledge may increase and that Universala Frateco, which you and I and all other homamantoj so greatly desire, shall become realized.

—H. W. Yemans.

AS TO REFERENCE WORKS

MANY Esperantists who have observed the inaccurate "write-up" of Esperanto in the New York Almanac will be interested to learn that the editor of

this publication has asked *Amerika Esperantisto* to furnish material for the next edition. We also have a note to the effect that the Thomas Nelson & Sons Loose Leaf Encyclopedia, New York City, has been misinformed from the same source. Will some reader who has time to do so look up this work in his library, copy the misinformation and send it to this magazine, and also write a letter of protest to the publishers of the encyclopedia? The editor of the *Saturday Evening Post* threw up his hands when Mr. Baker called to see him, and reported that the nonsense he had published brought him hundreds of protesting letters. Your letters had the desired effect and you'll see no more such twaddle in the *Post*—at least not on the subject of Esperanto. We repeat, not on the subject of Esperanto.

STATISTIKO POR ESPERANTO

EN Germanujo nia afero kreskas ĉiutage, la germanaj registaroj komencas interesiĝi pri Esperanto, sed ili postulas precizan statistikon, ili ne nur volas scii, kiom da grupoj ekzistas, sed ankaŭ kiom da grupanoj. Tial estas necese aranĝi kiel eble plej rapide statistikon. La eldonejo de nia fame konata ilustrita revuo "Universo" afable donacis la su-

mon por ebligi tion. Oni forsendis pli ol 2,000 demandkartojn al ĉiuj grupoj de la tuta mondo. Estas necese, ke ĉiuj grupoj respondu kiel eble plej rapide. Grupoj, kiuj ne ricevis demandkarton, bonvolu tuj skribi al Dro. Schramm en Dresden 20, pro ke li povu sendi ĝin. La afero estas tiel grava por ni, ke neniu grupo devas manki en la statistiko.

PRI ABONO DE GAZETOJ

